

Svisa Esperanto-Societo informas

jaro 2014 numero 4-a : novembro-decembro 2014
dissendo je la 5-a de novembro




Fotis Mireille Grosjean.

La Kastelo de Neuchâtel. En ĝi kunvenas la ekzekutiva povo de la kantono, kiu decidis pri la invito de la Tria Tutmonda Kolokvo 2015 pri la instruado de Esperanto.

Ege kulture riĉa semajnfino travivita en kontakto kun André Cherpillod en La Chaux-de-Fonds kaj La Sagne.



André Cherpillod preleganta pri la katarismo ĉe la Hotelo von Bergen.



André Cherpillod preleganta ĉe CDELI

La sabaton 6-an de septembro ĉe CDELI André Cherpillod matene demonstris, kiom neatendite varie funkcias la lingvoj gramatike, leksike

kaj stile. Kaj posttagmeze li konsciigis nin pri la grava rolo ludita de Gaston Waringhien favore al la maturiĝo de Esperanto ne nur vortare, sed ankaŭ beletre, kulture, traduke. Vera lumturo de Esperanto li estis. Tiu stud-tago konkludiĝis ĉe la Hotelo von Bergen en La Sagne per vespera manĝo sekvata de kongresaj kaj feriaj raportoj.

Kaj la dimanĉan matenon André Cherpillod malkovrigis al ni, kiom drame kaj perforte la vatikana potenco persekutis la katarismon, sin pretigante samtempe al posta neniigo de aliaj religiaj movadoj. Konkludiĝis tiu riĉa renkonto kun unu el la nunaj plej kleraj esperantistoj per promeno en torfeja paradizeto.

Ĉiuj profitis akiri verkojn, kiujn André Cherpillod ne nur verkas, sed ankaŭ mem eldonas. Pri ili la libro-servo de CDELI eldonis katalogon rete konsulteblan.



Svisa kalendaro

Ankaŭ vizitu la retan version de la kalendaro prizorgata de Luc Allemand

www.svisa-esperanto-societo.ch/kalendaro

Novembre

15 : *Chaux-de-Fonds* : CDELI-Studsabato.

24 kaj 27 : *Basel* : ESB-kunvenoj.

Decembre

3 : *Wil* : EKW-rakledvespero.

6 : *Chaux-de-Fonds* : CDELI : Metodika kleriĝo kun Claude Gacond pri la strukturŝanĝa didaktiko.

6 : *Basel* : ESB-kunveno.

13 : *Chaux-de-Fonds* : CDELI-Studsabato festa.

13 : *Lausanne* : Zamenhofa Festo.

Januare 2015

24 : *Chaux-de-Fonds* : CDELI-Studsabato.

Februare

2 : *Lausanne* : Ĝenerala asembleo.

7 : *Chaux-de-Fonds* : CDELI : Metodika kleriĝo kun Claude Gacond pri la strukturŝanĝa didaktiko.

21 : *Chaux-de-Fonds* : CDELI-Studsabato.

Marte

21 : *Chaux-de-Fonds* : CDELI-Studsabato.

Aprile

18 : *Chaux-de-Fonds* : CDELI-Studsabato.

Maje

13 : *Neuchâtel* : Ĝenerala Kunveno de SES.

13-16 : *Neuchâtel-La Chaux-de-Fonds* : 3-a Tutmonda Konferenco pri Instruado de Esperanto.

Junie

6 : *Chaux-de-Fonds* : CDELI : Metodika kleriĝo kun Claude Gacond pri la strukturŝanĝa didaktiko.

20 : *Chaux-de-Fonds* : CDELI-Studsabato.

Organizantoj de kursoj kaj stud-kunvenoj

Basel : *Esperanto-Societo Basel* : PF 178, 4005 Basel, tel : 0049 76 214 57 12.

La Chaux-de-Fonds : *CDELI*, Bibliothèque de la Ville, strato Progrès 33, CP 3034, 2303 La Chaux-de-Fonds. claude.gacond@ne.ch , tel : 032 967 68 42.

CDELI-Studsabatoj : Aliĝo ĝis la mardo antaŭ la koncerna studsabato ĉe Nancy Fontannaz . Rete : nancy.fontannaz@gmail.com , tel : 021 728 31 27.

CDELI-Metodika kleriĝo kun Claude Gacond : Aliĝo ĝis la mardo antaŭ la koncerna kultur-sabato ĉe Claude Gacond. Rete : gacond@bluewin.ch, tel : 032 926 52 32.

Lausanne : *Laŭzana Esperanto-Societo* : CP 246, 1000 Lausanne 22.

www.esperanto-lausanne.ch , tel : 021 647 29 28. www.eo-l.ch .

Genève : *Grupo La Stelo* : CP 734, 1212 Grand-Lancy 1, tel : 022 771 24 37.

kaj *Asocio Esperanto-Genève-Régions* : esperantoegr@gmail.com .

Neuchâtel : Luc Allemand : luc.allemand@bluewin.ch .

Wil : *Esperanto-Klubo* : <http://esperanto.ch/wil> .

Rememorigilo

SES informas

Redakci-konkludo

Per tiu ĉi numero 2014-4 Claude Gacond konkludas sian mult-jaran redaktoran funkcion kun dankemo al siaj efikaj kunlaborintoj: Nancy Fontannaz, Stefano Keller kaj Richard Schneller. Al Dietrich Weidmann, la transprenanto de la redaktora tasko kun aro de projektoj, ĉiuj deziras sukceson.

Kotizoj al SES

Kun ricevado de *SES informas*

Fr. 10	Infanoj	ĝis 18 jaroj
Fr. 20	Junuloj	de 19 ĝis 29 jaroj
Fr. 35	Plenkreskuloj	ekde 30 jaroj
Fr. 50	Paroj	ekde 30 jaroj
Fr. 70	Patronoj	ekde 30 jaroj
Fr. 25	nura abono al <i>SES informas</i>	

Kontonumero de SES (POSTFINANCE)

Svisa Esperanto-Societo
2300 La Chaux-de-Fonds
17-581908-4
(por kotizoj kaj donacoj)

SES-estraro

La estraro atingebblas per : ses@esperanto.ch

Mireille Grosjean, kunprezidanto, Grand-Rue 9, CP 9, 2416 Les Brenets.

Tel.: 032 932 18 88 kaj 079 69 709 66.

Retpoŝto : mirejo.mireille@gmail.com

Dietrich Weidmann, kunprezidanto kaj redaktoro, Archstr. 2, 8610 Uster. Tel.: 044 251 50 25.

Retpoŝto : info@esperanto.ch

Nelida Weidmann González, respondeca por familiaj renkontiĝoj kaj aktivecoj. Archstr. 2, 8610 Uster. Tel. : 044 251 50 25. Zorgas ĉefe pri SFERO.

Sonia Daubercies, Coin d'En Bas 5, 1092 Belmont-sur-Lausanne. Tel. : 021 728 26 51 kaj 079 649 88 86. Zorgas ĉefe pri organizado de eventoj.

Dieter Rooke, Kreuzimaatweg 20, 3812 Wilderswil. Tel. : 078 637 18 41.

Komisiito pri financoj: Oxana Grazhdanova, Léopold-Robert 12, 2300 La Chaux-de-Fonds. Tel. : 076 533 21 76.

Konsultu la retejon de SES !

www.svisa-esperanto-societo.ch



Vivo de SES

Redaktis Claude Gacond

SES informas

havos novan redaktoron ekde 2015 :

Dietrich Michael Weidmann

Jen kiel li priskribas siajn projektojn :

Claude Gacond, per la aktuala numero 2014-4, transdonas la redaktadon de *SES informas* al nova teamo sub la gvido de Dietrich Michael Weidmann. La bulteno aperos ekde 2015 en nova formo kaj laŭ nova koncepto. Post aprobo de la estraro de SES la nova koncepto estos prezentita jarfine en la retejo de SES sub: <http://www.svisa-esperanto-societo.ch>

SES informas

Antaŭvidita estas, ekde 2015, reta eldono de *SES informas* kun la kalendaro, aktualaj klubaj informoj, kiu regule (almenaŭ unufoje monate) estos ĝisdatigita.

Maldika papera eldono (kun protokoloj kaj gravaj internaj informoj de SES (laŭ bezono 4, 8 aŭ 12 paĝoj en formato A5) aperos estonte en februaro (redaktofino 31-an de januaro) kaj komence de septembro (redaktofino 20-an de aŭgusto).

Svisa Espero

Nove aperos dufoje jare bela kolora revuo sub la titolo *Svisa Espero*. Ĝi eldoniĝos fine de aprilo kaj komence de novembro (redaktofinoj estos la 20-a de marto kaj la 20-a de oktobro). *Svisa Espero* havos formaton A4 (nombro de paĝoj antaŭvideble inter 32 kaj 64).

Artikoloj en *Svisa Espero* povos aperi en la naciaj lingvoj de Svislando, en Esperanto kaj escepte ankaŭ en aliaj lingvoj.

La revuo estos sendita al la abonantoj de *SES informas* kaj aldone al ĉiuj naciaj parlamentanoj de Svislando, al ĉiuj eduk-direktoroj de Svislando, al la Unesko-

respondeculoj, al la gravaj svisaj bibliotekoj kaj alturnejoj kaj diversaj aliaj gravaj publikaj instancoj.

La renaskiĝo de la nova *Svisa Espero* estos parto de niaj aktivecoj por la festado *60 jaroj post la Unesko-Rezolucio de Montevideo*.

La unua numero de *Svisa Espero* en aprilo 2015 estos plene dediĉita al tiu memorado kaj nature al la *3-a Tutmonda Kolokvo pri la Instruado de Esperanto*. La revuo estos kolora kaj akceptos por sia financado kontraŭ pago anoncojn de privatuloj kaj entreprenoj.

Informoj por la reta kaj papera eldonoj de *SES informas*, de *Svisa Espero* kaj la kalendaro estu senditaj rete al ses-informas@esperanto.ch aŭ papere al Dietrich Michael Weidmann, Poŝtfako 26, 8613 Uster 3.

Volontuloj, kiuj deziras kunlabori por la novaj *SES informas* kaj *Svisa Espero* estos invititaj anonci sin ĉe la nova redaktoro. Kontribuaĵoj kaj ideoj bonvenas.

-oOo-

Ĝenerala Kunveno de SES 2015, antaŭanonco

Ĉar la malfermo de la **Tria Tutmonda Kolokvo pri Instruado de Esperanto** okazos merkrede la 13-an de majo je la 19a horo, ni planas la ĝeneralan kunvenon en la sama urbo Neuchâtel je la 15a horo. Okazos je 17h45 komuna vespermanĝo kaj la partoprenantoj povos atingi la aŭlon de la universitato por ĉeesti la malfermon. La loko estos en vasta domo strato Léon-Berthoud 8 (Vidu foton kovrilpaĝe). Estas ne pozitive okazigi tian kunvenon iun merkredon; tamen, pro la tre malofta okazigo de tutmonda kolokvo, ni opinias, ke tio estas la plej bona solvo.

La estraro de SES.

7-a SFERO en Centro Adonia, Vordemwald, Argovio

En amika kaj familia etoso disvolviĝis de la 17-a ĝis 19-a de oktobro 2014 ĉe la Centro Adonia en Vordemwald la 7-a SFERO. Ĝin partoprenis 36 personoj, inter kiuj multaj infanoj kaj gejunuloj, kaj dum la konkurso ĉeestis entute 52 personoj.

Vendred-vespere la infanoj ekzercis la kanton de Mariaĉi sub la gvido de Jasmin Weidmann, kiun ili prezentis sabate post la kanto-konkurso kun la artistinoj Linda Weidmann kiel Arlekenino kaj Alice Schönenberger kiel

Kapitano. Ambaŭ inter la prezentado de la konkurso kaj la anonco de la gajnintoj ankaŭ prezentis du skeĉojn.

Sabat-matene okazis ekskurso al la historia urbocentro de Zofingo kaj posttagmeze estis la kulmina evento de la ĉi-jara SFERO, nome la prezentado de la finalo de la 1-a Svisa Esperanto-Junularo-Kantokonkurso (SEJK).

Sabate post la tagmanĝo estis honorigita Paul Scherrer pro sia 50-jara sen-interrompa individua membreco en UEA. La kunprezidantino Mireille Grosjean kunportis la diplomon el Bonaero kaj la estraro decidis transdoni ĝin pere de eta ceremonio kadre de la ĉi-jara SFERO.



Jen Paul Scherrer okaze de tiu ceremonio inter la gekunprezidantoj Dietrich Weidmann kaj Mireille Grosjean.

Finalo de la 1-a Svisa Esperanto-Junularo-Kantokonkurso

La unuan Svisan Esperanto-Junularo-Kantokonkurson, kiun organizis Svisa Esperanto-Societo fine de SFERO, partoprenis 4 verkoj prezentitaj de 5 gejunuloj, ĉiuj estas lernantoj de la lernejo Granda Ursino en La Chaux-de-Fonds. Ilin akompanis ilia instruistino Monika Molnar. Kira Maire el La Chaux-de-Fonds per sia kanto „Profitu de la vivo!“ gajnis la unuan premion de SEJK. La dua premio estis atribuita al la plej junaj konkursantoj, la duopo Sydney Bracher kaj Bastien Voëlin por la kanto „Miaj vortoj kaj manieroj“, kiu ankaŭ gajnis la publikan premion. La trian premion ricevis la duopo Malou Graf kaj

Antoine Senn por „Vojaĝo“. La ĵurio konsistis el Mirejo Grosjean, Susi Sloof kaj Prakash Khadaka.

2 fotoj pri partoprenantoj al SFERO videblas sur la lasta paĝo, ili montras la gajnintojn de la kanto-konkurso kaj la ekskursantojn en Zofingo.

La venonta SFERO okazos antaŭvideble fine de septembro
2015
en Broc en la kantonu Friburgo.

-oOo-

Alemanlingva filmo pri Esperanto en Kantono de Neuchâtel

Aperis alemanlingva filmeto de Nelida Weidmann kun Dietrich Weidmann, Mireille Grosjean, Luc Allemand kaj Claude Gacond sub la titolo „Myni Esperanto-Schwyz“, kiu prezentas la 3-an Tutmondan Kolokvon pri la Instruado de Esperanto kaj raportas pri CDELI. La filmeto videblas sub :

<https://www.voila-ma-suisse.ch/de/Assets/Details/863>

-oOo-

Svisa vivo

Venontaj renkontoj

CDELI

Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds
Strato Progrès 33, Buslinio 304 direkto Hôpital, haltejo Bibliothèque

Venontaj Studsabatoj

2014 : novembro 15 kaj decembro 13.

2015 : januaro 24, februaro 21, marto 21, aprilo 18, kaj junio 20.

Detala informilo : www.cdelli.org/Sabatoj-de-CDELI.html

Venontaj Kulturaj Sabatoj
pri metodika formiĝo al la strukturŝanĝa didaktiko
per utiligo de la instruafiŝaro kaj de bildoj.
Instruanto Claude Gacond

2014 : decembro 6.

2015 : februaro 7 kaj junio 6.

Tiuj kulturaj sabatoj estas ne nur dediĉitaj al la esperanto-instruado struktur-ŝanĝa per didaktika afiŝaro, sed ankaŭ al lingva plikleriĝo. La koncerna instru-materialo estas efika komplemento al la tradicia instruado de esperanto, eĉ se la uzata terminaro tendencas emancipiĝi el la terminologia tradicio greklatina, kiu fakte ne konvene priskribas la funkciadon de esperanto. Instruistoj kaj kurs-gvidantoj certe pedagogie **multe profitos el tiuj metodologiaj sabatoj.** Sed same **esperanto-studentoj** celantaj nuran perfektigon en la praktiko parola kaj skriba de esperanto **tre profitos el tiuj kultur-sabatoj.**

Al la kurs-kotizo de po CHF 20.- por kultura sabato aldoniĝos la kosto de po 10 centimoj por folio je formato-A4, ĉu de la instru-afiŝoj kaj ĉu de la proponataj ekzercoj. Grandparte tiuj dokumentoj plej ofte jam kapteblas rete.

Partoprenontoj nepre sin anoncu al Claude Gacond almenaŭ ĝis la mardo antaŭ la koncerna kultur-sabato.

Lia poŝta adreso : Chevreuils 14, CH-2300 La Chaux-de-Fonds.

Lia retadreso : gacond@bluewin.ch.

Lia telefono : 032 926 52 32 (vespere 20h00 ĝis 22h00 sen responda garantio).

Nealiĝinto ankaŭ bonvenas, sed kun plusa pago de CHF 10.-

Eblas jam konatiĝi kun la menciita didaktika afiŝaro, kaj eĉ mem reprodukti ilin tra la kanalo de la retejo www.esperanto-gacond.ch . Sed aldone al la konsulteblaj afiŝoj ĝis nun mankas la necesaj metodikaj konsiloj, kiujn Claude Gacond siatempe parole donis al la pedagogoj, kiujn li didaktike formadis.

Parta partopreno al tiuj kultur-sabatoj eblas kaj ankaŭ estas profitigaj. Do kiuj ne povis ĉeesti antaŭajn renkontojn, tiuj tamen bone profitos el sekvaj sabatoj.

-oOo-

Loka vivo

Basel

Esperanto-Societo Basel

Postfach 178, 4005 Basel

esperantobasel@gmx.ch

Venontaj kunvenoj :

Lunde 24-an de novembro : Saint-Louis Babilado „La Fadeno“ ekde la 19-a horo en la restoracio La Poste en Saint-Louis.

Jaŭde 27-an de novembro : Programo en Riehenring 131 ekde la 20h15.

Sabate 6-an de decembro : Zamenhofa festo en Svislando.

-oOo-

Genève

Esperanto-Grupo La Stelo

1200 Genève : lastelo@gmail.com

La grupo kunvenas de tempo al tempo en la Maison des Associations, 15, rue des Savoises, 1205 Genève.

Junulara Esperanto-Grupo de Genève

junularagrup@gmail.com

Renkontoj okazas unu- aŭ dufoje monate (merkredon aŭ jaŭdon) ĉe Green Café, 77 boulevard Carl Vogt, Plainpalais, Genève, je la 19a horo.

Asocio Espéranto-Genève-Régions

www.esperanto-geneve-regions.info

La *Lunda Grupo* festas sian 12-an datrevenon !

Preskaŭ ĉiun lundon ekde 12 jaroj la *Lunda Grupo* kuniĝas en kafejo en Genève por babili esperante. La grupo estis kreita por ĉiuj, kiuj volas paroli esperanton flue kaj senbremse : komencantoj, progresantoj, fakte ĉiuj, kiuj estas babilemaj !

Ni decidis kunveni ĉiun semajnon je la sama horo kaj en la sama loko - nuntempe Le Galicia, rue des Gares, je la 18a horo – tiel estas pli facile scii kiam kaj kie alveni. La restoracio estas apud la stacidomo, do ankaŭ taŭgas por

vizitantoj. Do ni kreas grandan bruaĉon, ĉar babilado iĝas foje laŭta – grandaj diskutoj okazas, ekzemple, pri ĝardenumo, kudrado, dorlot-bestoj, genealogio, politiko – eĉ pri gramatiko ! Bone por plivastigi la vortprovizon.

Estas simpla kaj agrabla aranĝo, kiu ne bezonas multe da organizo – ni nur certigas laŭeble, ke ĉeestas almenaŭ unu grupano. Kutime ni estas ĉirkaŭ 6, foje 10 aŭ 12. Se la restoracio estas fermita, ni foje organizas piknikon en la Botanika Ĝardeno, kiel ni faris por la Pentekosta Lundo – alia ĝoja renkontiĝo !

Kiam ni bezonas informi la grupanojn pri ŝanĝo, tiam ni uzas du rimedojn : retmesaĝon kaj nian retpaĝon. Laŭbezone ni ankaŭ vokas telefone al tiuj, kiuj ne havas interreton.

-oOo-

La Chaux-de-Fonds

Pri la sabataj kursoj vidu la rubrikon CDELI.

Ĝojige en La Chaux-de-Fonds kreskas la nombro de la aktivaj lokaj esperantistoj. En tiu ĉi bulteno aperas artikolo de gesinjoroj Danielle kaj Wolfgang Carrier, kiuj loĝas en mia strato Chevreuils. Tio donas al mi la eblon mirigi la informiĝantojn pri la nombro de esperantistoj. Kiam ili demandas : Ekzistas kiom da esperantistoj en la mondo ? Tiam mi tute honeste respondas : Mi ne scias, sed pri mia strato Les Chevreuils mi kapablas alporti precizan statistikon : ekzistas du esperantistaj paroj, la Gaconda kaj la Carriera. Kaj en la pli suba strato Les Postiers vivas la esperantistino Véra Zaslowski kaj ankaŭ troviĝas la renkontiĝejo Kultura Centro Esperantista. Kaj se vi iras unu straton pli sube, tiam vi rimarkas la Lernejon *La Grande Ourse*, kie esperanto estas instruata al ĉiuj gelernantoj, kaj ĵus 5 el ili estis premiitaj en esperantlingva kantkonkurso.

Kaj aldone mi povas rakonti pri aliaj personoj esperantistaj, interalie pri la ĵus elektita nova kasistino de SES Oxana Grazhdanova. Komike, ĉu ne ! Kaj mi konstatas, ke tio vekas esperanto-lernemon!

-oOo-

Lausanne

Laŭzana Esperanto-Societo

Société lausannoise d'espéranto

Poŝtfako / case postale 246 * 1000 Lausanne 22

www.esperanto-lausanne.ch * 021 647 29 28 * www.eo-l.ch

Venontaj kunvenoj

Sabate, la 13-an de decembro

Zamenhofa Festo en la nova loko de USL kaj poste en restoracio en Ouchy.

Lunde la 5-an de januaro 2015 : Programo decidota.

Lunde la 2-an de februaro : Ĝenerala asembleo.

Pri Nicole Margot kaj la revuo *Etnismo*

En Lausanne vivas kaj agadas Nicole Margot, la redaktisto de la revuo *Etnismo*. Fakte la partoprenantoj al esperanto-aranĝoj almenaŭ konatiĝas kun tiu ĉi revuo, kiam Nicole Margot raportas pri sia redakta laboro por ĝi. Tiurilate jen foto farita en CDELI dum la matena kafo-paŭzo okaze de la sabata prelegado de André Cherpillod la 6an de septembro.



Tiam Nicole Margot prezentis la ĵus aperintan numeron 93-an de *Etnismo*. Pro la graveco mem de tiu dokumento, kiu koncernas Svislandon, ni ĉi-sekve aperigas recenzeton.

Etnismo

Informilo pri etnaj problemoj

La numero 93-a de *Etnismo* aperinta en septembro 2014 estas grandparte dediĉita al la nuntempa plurlingva situacio en Svislando.

Eĉ al la svisoj mem ĝi alportas informojn ne ĉiam bone konatajn pri la kvarlingveco aŭ kvinlingveco aŭ eĉ prefere multlingveco de la kompleksa Helveta Federacio.

Gratulon al Alain Favre kaj Nicole Margot por tiu utila dokumento klariganta al la svisoj mem la neordinarecon kaj malfacilecon de la propra lingva situacio

kaj certe helpa al la esperantistoj dezirantaj respondi al eksterlandaj samideanoj sciemaj pri la onidire svisa poliglotismo.

Kiuj ne abonas la revuon Etnismo, tiuj povas direkti sin al Nicole Margot por almenaŭ aĉeti la menciitan numeron 93-an de tiu revuo. Adreso : Ch. des Lys 4, CH-1010 Lausanne aŭ n.margot@bluewin.ch

Aldone menciindas, ke la koncerna broŝuro ankaŭ alportas informojn pri aliaj lingvaj situacioj : la eŭska kaj gaskona, la frisa, la kataluna kaj la romaa.

Nicole Margot, senkulpiĝanta pri la malfrua apero de la numero 93-a de *Etnismo* tiel klarigas la kaŭzon de tiu malfruo : « *Mi bezonis longan tempon por redakti la artikolon pri la lingvoj de Svislando... Mi kolektis informojn kaj skribis la artikolon kun granda plezuro.* »

Ankaŭ persone mi trastudis tiun numeron kun granda plezuro kaj bone komprenas la kaŭzon de la malfruo ! Nefacilas klarigi la lingvan proprecon de Svislando.

Claude Gacond

-oOo-

Valezo

ESPERANTO-KURSO KOMENCIĜOS POST LA SOMERO !

Kurso komenciĝis la 12-an de septembro 2014 (vendrede) Ĝi disvolviĝas de la 19h30 ĝis la 21h30 en Bovernier, 7 km for de Martigny, atingebla per trajno, ĉe Familio Raymond kaj Franje Bourgeois, Rue des Ecoles 20.

Instruas Sonia Daubercies el Belmont/Lausanne. La 10 kursoj okazas dum 10 semajnoj. La tuto kostas CHF 100.-

-oOo-

Wil

Esperanto-Klubo Wil

Verena Chaves –Walder, Rosenhügelstrasse 22, 9230 Flawil

Tel. 071 393 41 49, chaves-walder@bluewin.ch

03.12.2014 : Rakledvespero kun rakontoj kaj kantoj.

Ĉekomence ĉiam disvolviĝas nia rakonta rondo.

La kunvenoj komenciĝas je la 19 horo en b`treff , stacidomo de Flawil.

Antaŭĝojas pri vigla partopreno Verena Chaves-Walder

-oOo-


Zürich

Esperanto-Societo Zuriko
Archstrasse 2, Postfach 26, 8613 Uster (Zürich) 3
Zuriko@esperanto.ch

Venontaj kunvenoj :

Ĵaŭdon, la 27-an de novembro – Kafejo Mandarin, 20h00 apud Stacidomo Stadelhofen, Zuriko. Libera kunveno kaj kafoklaĉo.

-oOo-



Al kongresoj kaj vivo tuthomara

Somera Esperanto-Studado (SES) 2014

Luc Allemand

La renkontiĝo komenciĝos sabate vespere la 12-an de julio kaj daŭros ĝis dimanĉe la 20-a en Nitra, Slovakio. El Svislando ni iras triope : Renata, Basile kaj mi. Ni jam ekveturas vendrede matene, retroviĝante je 8h15 en la stacidomo de Neuchâtel. 10h00 : Zuriko, tempo por kafo, kaj 18h30 : Vieno, Westbahnhof.

Mi, tiel dirite, respondecas pri la vojaĝo : De nia triopo estas mi, kiu jam estis en tiuj lokoj, scipovas la germanan lingvon, plej detale studis la horaron, kaj principe varbis la aliajn kunveni al renkontiĝo, kiun mi jam kutimas. Do nun en la orienta stacidomo de Vieno estas tempo por trovi plej taŭgan manieron por veturi al la internacia bus-stacio, de kie ni busos al Slovakio. Mi modeste kaj senhonte konfesas, ke mi tamen ne ĉion scias perfekte, ke mi ankaŭ devas iom serĉi surloke aŭ demandi lokulojn. Ni unue subeniras al metroejo kaj en granda

halo Renata insistas, por ke mi demandu nian vojon al iu-ajn. Tamen multaj turistoj pasadas kaj laŭ mi ne indas demandi ilin, kiuj ne scios pli bone ol ni.

Tiam aperas mezaĝa viro trankvile paŝanta, kiu ŝajnas nek speciale rapidemi, nek serĉi ion, kaj kiu ne portas turistan sakon. Li ne nur indikas al ni, kiun metrolinion uzi, sed ankaŭ helpas nin aĉeti biletojn kaj gvidas nin ĝis la ĝusta loko, vere afable donas sian tempon. Li fakte montriĝas kiel la plej taŭga persono por helpi nin pri la publikaj transportoj, estante mem laboristo ĉe la metroo.

Haltejo Erdberg, internacia busstacio : Ni povas facile aĉeti bileton rekte por Nitra, ĝi kostas nur 10 eŭrojn kaj ni ekveturos je 22h00. Tio lasas al ni tempon por vespermanĝo en stacia araba picejo.

En Nitra ni alvenas noktomeze. Mi montras la adreson de nia "kongresejo" al taksi-ŝoforo, li veturigas nin al la studenta hejmo *Zobor*, konstruaĵo kiun mi rekonas pro mia lasta vizito ĉi-tien antaŭ du jaroj. Kelkaj vekaj organizantoj bonvenigas nin duonhoron post noktomezo.

Homoj alvenas dum la sabato kaj Somera Esperanto-Studado (SES) oficiale komenciĝas vespere, kun sia kutima *Interkona vespero*. Ĉi-jare mi fariĝas « anĝelo ». Anĝeloj proksimume dudekope helpas al la disvolviĝo de tiu vespero, kaj ricevas flavan nomŝildon indikantan al aliaj partoprenantoj, ke ni estas jam spertaj esperantistoj kaj pretas helpi ilin dum la semajno. Fakte ne okazos multe da problemoj dum la semajno, do ni preskaŭ ne havos laboron.



Somera Esperanto-Studado-ejo en Nitra

Ekde la dimanĉo ĝis la posta dimanĉo, okazas esperanto-kursoj ĉiutage – krom je merkredo, ekskurso-tago – tio je diversaj niveloj en 10 klasoĉambroj.

Interalie Stano Marček instruas per sia rekta metodo al tutkomencantoj kaj Bertilo Wennergren klarigas gramatikajn tiklaĵojn al spertuloj. Persone mi vizitas la klason de Kontantin Tiĥomirov (Kostik), ankaŭ por progresantoj, kie ni lernas novajn kaj nekutimajn vortojn, traktante diversajn temojn kiel vivloko, nutrado, homa korpo, ktp. Ni uzas la libron *Ni parolas esperante*, sufiĉe malnova sed bonege elpensita slovaka lernolibro. Kostik vendas al ni la lastajn ekzemplerojn, igante la eldonon ĵus elĉerpita.

Vespere ĉiutage okazas mojosa koncerto de spertaj artistoj kiel JoMo (Jean-Marc Leclercq), Kimo (Kim Jesus Henriksen), Kaŝi (Carsten Schnathorst), Martin kaj la Talpoj (Martin Wiese). La muzikstiloj ĝenerale estas diversaj variantoj de roko, ĉiam danciga. Iun vesperon dum koncerto subite eniris granda fluginsekto tra la fenestro en la salonegon. Ĝi tre bruis zigzagante kaj ĉiuj mire ekrigardis ĝin, fotadis ĝin, kiam ĝi haltis ĉe la plafono.



Dum la ekskurso en Bratislava.

Internacia grupeto kun Stefano Menegoli el Italio, Mauro Vlader Olivé el Katalunio, Luko Allemand el Svislando, Ĵenja Belkova el Slovakio, Janka Stecova el Slovakio, Nicolas Viau el Kanado, Heinz-Wilhelm Sprick el Germanio

Merkrede mi partoprenas la ekskurson al Bratislava. Malnova kastelo ĉe la Danubo, nova kastelo, piedurbocentro... Dum la reveno al Nitra mi dormas en la buso, kiam subite ŝoka bruo vekas min. Okulferme mi unue pensas, ke simple botelo falis surplanken en la buskoridoro, tamen post momenteto mi malfermas la okulojn kaj ekkonscias, ke nia buso haltas ĉe flanko de aŭtoŝoseo. La ŝoforo iris eksteren, ĉiu demandas sin, kio okazis, pluraj supozas, ke ni trafis iun objekton aŭ beston. Kiam ni reekveturas, ni iras malrapide laŭ la ŝosea bordo, preterpasataj de ĉiuj aŭtomobiloj. Finfine alveninte al nia studenthejmo kaj elbusiĝinte ni povas ĉiuj vidi, kio okazis : la pneŭo de la antaŭa dekstra rado estas plata.

De ĵaŭdo ĝis sabato okazas vegetarana kongreseto ene de SES, al kiu mi partoprenas. Heidi Goes, Peter Baláž, Christopher Fettes kaj Stano Marček animas ĝin per prelegetoj pri veganismo, vegana kuirado, pri historio de *TEVA* (tutmonda esperantista vegetarana asocio), kaj per atelieroj, dum kiuj ni pretigas kaj gustumas freŝajn fruktosukojn kaj "laktojn" el diversaj nuksoj aŭ cerealoj. Sabate ni pretigas dolĉaĵojn por la vespera postkoncerta "aperitivo" : buloj el daktiloj, aveloj kaj akaĵuoj, kaj aliaj kun bananoj, rulitaj en kokosnuksa raspo.

Iun vesperon okazas kvizo dum la vespero, gvidata de Marek Blahuš. Temas pri konkurso inter tri kandidatoj kun diverstipaj demandoj. Mi estas unu el la tri partoprenantoj, kaj same kiel en televidaj ludoj, ni havas publikon. Amuze estas, ke unu el la demandoj, al kiu mi kompreneble tuj respondis, estis tiu : « Kiun alian esperantan signifon havas la mallongigo *SES* ? (krom *Somera Esperanto-Studado*) » Nu, estus insulto doni al vi la respondon, se vi legas la gazeton, por kiu mi nun skribas.

Sabate vespere, la lastan vesperon de la semajno, ĉiu povas prezenti sursceneje sian produktaĵon : muzikon, teatron, dancon ktp... Persone mi por la tria fojo ludas la skeĉon de Raymond Schwarz *Prelego pri fundamentaj elementoj de esperanto*. Estas agrable konstati, ke homoj multe ridas kaj aplaŭdas, kaj poste gratulas min.

La svisa triopo forlasas la lokon dimanĉe posttagmeze per taksio, buso, trajno. En Vieno ni pasigas kelkajn horojn, antaŭ ol kapti la noktan trajnon je la 23-a horo. Ankaŭ Julia, alia partoprenintino de SES kaj amikino, atendas noktan trajnon en la ĉefurbo, kaj sukcese retrovas nin por ĝui tiujn horojn kun ni. Picoj en picejo de malnova kvartalo, reveno al la stacidomo, trinkado de kafoj atendante nian trajnon, kiu malfruas.

La sekvan matenon ni alvenas en Svislandon, pli-malpli sub pluvo, same kiel antaŭ nia foriro. Similas al revo : Ĉu vere ni estis for ? ĉu vere okazis semajno ? Ho jes, tamen... !

Luc Allemand

-oOo-

Mia plej fora Universala Kongreso la 99-a en Bonaero

Dieter Rooke

En la suda hemisfero, kie regas vintro dum nia somero, min bonvenigis kvazaŭ alia mondo.

La ĉefurbo ne bon-aeras pro densa trafiko. Senhejmuloj kaj vagabondoj sur trotuaro, eĉ antaŭ nia kongresejo, la plej luksa hotelo Panamerikana.

Mi loĝis en la hotelo Ibis Obelisko kun s-ano el Vjetnamio kaj multaj aliaj kongresanoj. Matenmanĝe mi agrable kaj gaje babilis kun du bulgaroj. La temo babilada estis sufiĉe vulgara, laŭ la kutimo de balkanaj maskloj. Mi demandis ilin pri la popola kanto de "tri truoj". Ĝi vere ekzistas. La unuan fojon mi aŭdis ĝin de la bedaŭrinde tro frue forpasinta Trifonĉovski : Stalin, Tito, Dimitrov laŭvice malaperis en la *gehenon*. En la popola kanto la bulgaroj diras : "*truon*".

Kun la vjetnamano, mia samĉambrano, mi konversaciis pri lia interesa vivo : Li eskapis la teruran militon studante en Pollando la profesion de kapitano, dum lia frato tragike pereis. Ĉar en la hotelo nur ekzistis geedzaj litoj, mi mem saĝe kunportis aermatracon. Dum nokto do ne tro ĝenis min lia diskreta ronkado.

La inaŭguro enkondukis novan riton : La prezidanto de UEA, Mark Fettes, proponis silente kaj starante omaĝi la viktimojn de la nuntempaj militoj. Laŭ mia observo neniu restis sidanta.

Ĉifoje mi estis libera kaj ne havis taskon verki artikolojn por *Heroldo de Esperanto*. Tamen en mia menso mi estis formulanta sencenzuritajn frazojn.

Dum ekskurso tago mia amiko el Vjetnamio deziris vojaĝi kun mi memstare al Montevideo en Paragvajo. Sed li tute neglektis ĝustatempe peti vizon. Tial ni kune aliĝis al TEJO-ekskurso.

Ni kune vizitis la nacian artan muzeon. Unu pentraĵo estis unukolora, flava kun eta kruco blanka en mezo. Alia grizaĵo, kun konuso, kubo kaj globo : Kia normalulo komprenus tiun ĉi mesaĝon ?

Pri programeroj en la UK mi ne detale rakontos- ĉar mi ne plu estas ĵurnalisto. Krome ili estas legeblaj kaj foje eĉ spekteblaj en jutubo, same kiel la kontribuoj el la kongresa universitato.

Por mi aparte anim-skua estis la akcepto okaze de nacia festotago en la svisa ambasadejo. Jam ekster la rezidejo pompis la flagoj de svisaj kantonj, la berna urso kompreneble kun ruĝa kaco. Enirinte la portalon ni donace ricevis svisan insignon : la ruĝa standardo kun kruco blanka.

Por diplomate svisiĝi mi tuj kaj senprokraste alpinglis ĝin. Jam eksonis svisaj militaj marŝoj, junaj profesiaj muzikistoj de la svisa armeo ludis por abunda publiko. Prezidento de Svislando, s-ro Burkhalter, sendis politikan mesaĝon al ĉiuj ĉeestantoj, kvankam nur en la hispana lingvo. Por ekkanti la nacian himnon de Svisio oni distribuis versiojn en pluraj lingvoj. La rezulto estis nekonvinka. Pli forte oni kantis la nacian himnon el Argentino !

En iu angulo ekodoris svisa fromaĝo. Servopretaj gekelneroj konstante proponis bongustaĵojn. Iu konsilis min baldaŭ peti la svisan civitanecon, ĉar mi estis la sola malvisto inter la invititoj el la UK !

Dum la fermo de la UK mi kantis despli entuziasme la "*Esperon*" kune kun la japano Hori Jasuo.

Dieter Rooke.

-oOo-

Akompanas la nunan *SES informas* varbilo al la venonta
82a Itala Kongreso de Esperanto
okazonta en San Benedetto del Tronto fine de aŭgusto 2015.
Certe la ĉi-sekva raporto instigos vin tuj aliĝi al tiu renkonto !

81a Itala Kongreso de Esperanto

Danielle kaj Wolfgang Carrier



Tiu Kongreso okazis de la 23-a ĝis la 30-a de aŭgusto en Fai della Paganella kun la temo *Esperanto kaj novaj teknologioj*.

Ĉiujare la itala Kongreso disvolviĝas en alia loko. La partoprenantoj tre ŝatas tiel iom post iom malkovri Italion, sed tiu farmaniero aldonas plian streson al la organizantoj !

Fai della Paganella estas grandioza panorama altebenaĵo je ĉirkaŭ 1000 metroj super la marnivelo, kiu elstaras la valon de la rivero Adige ĉe la deklivoj de la monto Paganella.

En Fai della Paganella arkeologoj malkovris spurojn de la retoj, antaŭromana popolo, kaj de grava bronzepoka establiĝo. Historie la regiono estis intime ligita al siaj nordaj najbaroj, nun Aŭstrio. Inter la plej konataj historiaj konstruaĵoj de tiu tempo elstaras la palaco de Fai, konstruita de grafoj Spaur, kiel somera rezidejo, tio ĉirkaŭ la jaro 1620.

La regiono evoluis kiel turisma stacio. Ĝi estas tipe feria loko por familioj, somera kaj vintra, eĉ por maljunuloj, kiuj povas promeni laŭlonge de la temaj vojetoj ĉirkaŭantaj la vilaĝon. En tiu ĉi sezono la ciklamenoj lumigis la arbarojn je grandega plezuro por niaj okuloj.

La plej altaj pintoj, la Paganella kaj monto Fausior, situas respektive je 2'125 kaj 1'554 metroj.

La lokanoj bone konservis la pejzaĝon kaj la montvilaĝan etoson. Ĉi tie ne staras grandaj konstruaĵoj, bovinoj ankoraŭ paŝtas en la verdaj herbejoj.

Rilate al la Kongreso flagrubandoj kaj afiŝoj en esperanto montriĝis sur la fasado de multaj konstruaĵoj. Ĉiuj loĝantoj kaj turistoj eksciis, ke okazas esperanta kongreso.

Dum la solena inaŭguro la lokaj aŭtoritatoj substrekis, ke ili fieris gastigi organizon, kiu antaŭen metas pacvalorojn, kunlaboron, interŝanĝon inter la homoj kaj popoloj de la tuta mondo. La festparoladon “Perspektivoj por Esperanto, hodiaŭ” faris Stefan Mac Gill, la vicprezidanto de UEA. Plie li prezentis la seminariojn kaj kursojn. Ugo Tonini, la prezidanto de la Trenta Esperanta Klubo, prezentis la ekskursojn. (2 fotoj videblas sur la antaŭlasta paĝo.)



Instruas Ilona Koutny dum la seminario pri *Esperanto kaj novaj teknologioj*

El la 223 listigitaj aliĝintoj de 22 landoj ne ĉiuj ĉeestis, inter ili kelkaj afrikanoj, ĉar nur unu el ili akiris la necesan vizon ! Ĉeestis 8 svisoj, inter kiuj Nicole Margot prezentis Svislandon.

Estis granda ĝojo konatiĝi kun novaj samideanoj kaj ankaŭ revidi malnovajn konatojn !

Matene ni povis elekti inter seminarioj pri *Esperanto kaj novaj teknologioj*, kiun gvidis Ilona Koutny, aŭ pri la *AMO-4 : Kiel altigi la prestiĝon de Esperanto ?* - kunordigita de Stefan Mac Gill. Aliaj ebloj estis esperanto-kursoj baza kaj perfektiga kun Maria Butan kaj Rafael Matéos.

La partoprenantoj en seminarioj aŭ kursoj ne tre serioze ĉeestis. Tio ĉefe pro kelkaj ekskursoj, kiuj okazis samtempe ! Tio ĝenis interalie la elstaran instruistaron Maria Butan.

Prelegantoj abundis kun diversaj temoj, ekzemple :

Petro Chrdle : *Fratoj Ĉapek*, pri robotoj kaj la mondkonata dramo *R.U.R.-Rossumaj Universalaj Robotoj*.

Amri Wandel : *Kiom da esperantistoj troviĝas en la reta mondo ?* Laŭ komplikaj kalkuloj, ili estus 2.5 milionoj !

Davide Astori : *De esperantologio al interlingvistiko*.

Carlo Minnaja : *Ĉu vi konas la historion de la esperanta literaturo ?*

Zbigniew Gabor : *Ĉu socioj feliĉaj jam ne ekzistas ? Pri vivkvalito en Eŭropo*.

Anton Oberndorfer : *Radioparolado en esperanto tra la interreto*.

Kimie Markarian havis grandegan sukceson kun la prezentado de *Sorobano*, la japana vorto por abako.

Bedaŭrinde ni ne partoprenis en multaj prelegoj, kiuj okazis posttagmeze, kiam ni ekskursis aŭ promenadis; ni dediĉis la matenojn al la plibonigo de nia esperanto !

Inter la prelegoj ni havis unu horon por la demandoj, rimarkoj kaj kritikoj pri UEA. Tiuj abundis, kelkaj eĉ estis tiklaj. Stefan Mac Gill respondis, ke ĉiuj rimarkoj, plendoj estos konsiderataj, kaj ke la estraro de UEA provos fari plibonigojn. Sara Spanò protokolis tiun debaton.

En la distra parto :

Teatraĵoj :

-R.U.R : (Rossumaj Universalaj Robotoj) aŭ terura sonĝo, prezentita de juna energi plena artistaro el Ĉeĥio.

-Por la spektaklo *Feliĉas ĉiuj*, rakontanta la problemojn de la migrantoj alvenintaj en Italujon, la aktoroj eklernis esperanton. Ili uzis alterne la italan kaj esperanton. Kiam ili parolis en la itala, oni projekciis la esperantan tekston super la scenon, facile legeblan. De la aktoroj, la spektantoj vidis nur la vizaĝojn kaj manojn kaptitajn en moveblaj vandoj, kiuj estis samtempe dekoracioj. Tio amuzis multe la spektantojn.

Koncertoj :

JoMo entusiasmigis la publikon. Gejunuloj tuj ekdancis laŭ liaj dancigaj ritmoj.

Ĵak Le Puil kantis kanzonojn de sia malnova repertuaro, memorigante al kelkaj pri ties juneco.

Manŭel Rovere klopodis, kiel ofte, vigligi la ĉeestantojn kun karaokeo.

Dum la itala nacia vespero ni aŭdis montkantojn kaj militkantojn fare de la Campanil Bas, vira ĥoro el la regiono, akompanata de infanĥoro dum la unua parto de la koncerto.

Internacia vespero :

Dieter Rooke, Jun Liu kaj Nicole Margot tre bone prezentis Svislandon per siaj du kantoj de la svis-esperanta ĥor-repertuaro. Sylvie Plantier prezentis Francion, kantante la originalan tekston de *La dezertinto* per sia arda voĉo. Vera revelacio, tiu kantistino, kiel priskribis ŝin Manŭel Rovere !

Internacia trinkomanĝa nokto okazis meznokte, kiam ni jam dormis. Ĉar ni lasis kelkajn bongustajn svisajn varojn por la festo, Monique Arnaud deziris scii la sekvan tagon, kiu alportis tiujn frandaĵojn el Svislando. Mirinde kiel Monique senlace dediĉas sian tempon helpante la aliajn. Ŝi multe helpis kolekti de ĉiuj la kompletigitan demandaron, kiun bezonis Sara Spanò kadre de siaj studoj.

Ekskursoj :

Ni partoprenis nur en kelkaj ekskursoj :

-*Andalo kaj Lago de Molveno*. Tie ni vizitis fiŝbredan centron de malgrandaj salmoj, troveblaj nur en tiu lago. Iliaj gefratoj, pli pezaj, troviĝas en la nordaj maroj. Laŭ la natursciencistoj tiuj salmetoj restis kaptitaj en la lago Molveno post la glaciepoko. Ambaŭ vilaĝoj, Andalo kaj Molveno, troviĝas proksime de Fai della Paganella.



Efemera artaĵo de la natura parko Artesella



Efemera artaĵo de la natura parko Artesella

-*Artesella*. Tiu artnatura parko situante en la sudorientaj montoj de Trento kreigis je la jaro 1986. Ĉiujn verkojn krom unu faris artistoj de nordaj landoj. Tiu speco de arto ankoraŭ ne famas en Italujo. La verkistoj venas surloken, elektas spacon kaj kreas la verkojn kun la materialo trovita en la najbaraj arbaroj. Kiom da jaroj la verkoj daŭros en bonstato, tio dependas de la koncepto kaj de la materialo. Neniu priflegado estas planita. La naturo simple faras sian laboron. Dum la vizito ni miris pri la blinduloj, kiuj sekvis sen stumbli, kiel raŭpoj, la kelkfoje krutajn kaj glitigajn padojn.

-*Pieve Tesino* :

Muzeo PER VIA (laŭvoje). Tiu muzeo atestas pri la vivo de la loka popolo kaj la produktado de gravuraĵoj, kiujn la kolportistoj disvendadis, samtempe kiel merceroj en tuta Eŭropo, ĝis Rusujo, krom Francio. Eble ĉar tie oni produktadis gravuraĵojn en Epinal ? La kolportistoj ofte restis for de la hejmo dum monatoj, eĉ jaroj, lasante la virinojn zorgi pri la familioj. Tamen kelkaj riĉigis, malfermis imponajn vendejojn en la ĉefurboj de Eŭropo.

-*Muzeo de Alcide De Gasperi*, unu el la fondintoj de Eŭropo kun Konrad Adenauer, Jean Monnet kaj Robert Schuman.

-*Vizito de Fai della Paganella piede*. Ni vidis, kiel la familioj vivis en malkonfortaj montdomoj kun komuna spaco en la enirejo. Por varmiĝi la prapatroj pasigis sian vesperon en la staloj kun la brutaroj. La malnova preĝejo San Rocco situas supre kaj servas por kelkaj specifaj ceremonioj, sed San

Nicolò (18^a jarcento) estas la paroĥa preĝejo de Fai della Paganella. Parenteze la nomo *Faj* originus el la vorto “fago”.

-*Vizito al la ursoparko kaj bestaro.* Tiu vizito ne lasis daŭran impreson. Tamen ni multe amuziĝis, kiam urso ludis kun poŝtelefono, kiu estis falinta en ĝian areon. La posedanto klopodis kapti la poŝtelefonon per longa rimeno kun magneto, sed vane. Finfine la poŝtelefono finis sian vivon sub la imponaj sidvangoj de la besto.

Ni ne partoprenis en la ekskurso al Bolzano sed la partoprenantoj rakontis amuzan anekdoton pri *Ötzi*, kiu vivis antaŭ 5 mil jaroj, trovita de migrantoj en la itala parto de glaĉero, kiu disvastiĝas ankaŭ en Aŭstrio. *Ötzi* ripozas nun en iu muzeo de Bolzano. Aŭstrio postulas la restaĵojn de *Ötzi* asertante, ke li mortis en Aŭstrio! Nur pro la degelo de la glaĉero oni trovis lin en Italujo!

La estraro multe laboris kaj certigis bone disvolviĝantan Kongreson. Ni laŭdas ilin.

La 82-a Itala Kongreso okazos en San Benedetto del Tronto (AP) ĉe la marbordo, inter Ancona kaj Pescara, de la 22^a ĝis la 29^a de aŭgusto 2015. Iru kaj ĝuu tiun certe interesan renkontiĝon.

Retadreso: <http://kongreso.esperanto.it> aŭ: kongreso@esperanto.it

Danielle kaj Wolfgang Carrier

-oOo-

Pri grava viktimo de la unua mondmilito

Abunde raportadis ĉiuj radioj, televidoj kaj gazetoj eŭropaj ekde la komenco de 2014 pri la viktimoj de la unua mondmilito. Gravas sciigi, ke unu el tiuj unuaj viktimoj estis fakte la franca filozofo kaj scienculo Louis Couturat, eminenta planlingvisto.

Ni dankas al nia historiisto Andreas Künzli pro la ĉi-sekva detala viv-raporto pri la eksterordinareco de tiu homo.

Kaj ni aldone nepre menciui, ke CDELI havis la okazon savi plurajn tre signifajn manuskriptojn de Louis Couturat, kiuj pli kaj pli altiras la atenton de universitataj esploristoj. Jam tri el tiuj verkoj kreditaj definitive perditaj povis esti tiel publikigitaj. Kaj ĉi-jare scienculoj revenis plurajn tagojn en CDELI por pretigi la eldonon de almenaŭ du novaj manuskriptoj de Louis Couturat, kiujn ili kredis absolute neniigitaj. Ili admiris la savigan rolon de CDELI.

Pri tio ni havos la okazon detale raporti dum la venonta Asembleo de la Amikaro de CDELI, kaj ni profitas danki ilin pro ties regula financa helpado al la aktiveco, kiun ni grupe nelacigeble plenumadas.

Claude Gacond

100 jarojn post la morto de Louis Couturat (1868-1914)

laŭ Louis de Beaufront¹

De Andreas Künzli

Couturat kiel sciencisto

Antaŭ cent jaroj, lige kun la eksplodo de la Unua Mondmilito en aŭgusto 1914, forpasis Louis Couturat, la aŭtoro de la planlingvo Ido, en aŭtomobila akcidento ĉe Parizo. Indas rememori tiun faman korifeon de la planlingva movado, pri kies rolo, kiun li ludis en ĝi, ĝenerale malmulto estas konata.

LOUIS COUTURAT naskiĝis la 17-an de januaro 1868 en Ris-Orangis apud Parizo.² Lia patro devenis el Burgundio kaj lia patrino originis el la franca regiono Franche-Comté. Ĉar Louis estis la sola filo, li ĝuis apartan zorgadon flanke de la gepatroj. Sekve, Couturat fariĝis rimarkinda kaj sukcesa lernanto; li ricevis 34 premiojn kaj ekinteresiĝis kaj pri la antikva literaturo kaj pri teoriaj kaj aplikataj sciencoj. La jaro 1885, kiam li estis gimnazia studento, estis por li vera jaro de triumfo: li ricevis la honoran premion por filozofio, la unuan premion por fiziko kaj kemio, la unuan premion por natur-historio kaj la unuan premion por matematiko. En tiu tempo vekigis ankaŭ lia admiro por Greklando kaj la antikvaj grekaj poetoj kaj artistoj, kaj kiel fervora adepto de la belec-kulto li facile legis la verkaĵojn de Kartezio kaj Homero, do en la lingvoj latina kaj greka. Post sukcesa trapaso de malfacila ekzameno, en 1887 li estis akceptita de la 'Normala Supera Lernejo'³ en Parizo, en kiu li pasigis tri fruktodonajn jarojn kaj daŭre estis konsiderata kiel elstara lernanto, laŭdata de la instruistoj pro la precizeco de lia intelekto kaj pro la lucido de lia parolkapablo, kiu estis apogata de ekzakta kaj originala pensado. En 1890 li preparis sin por la agregacio;⁴ lia ĉi-rilata verkaĵo pri la persa civilizo troviĝas en la 5-a parto de *Histoire de l'art dans l'antiquité*. Kun gratulo de la ekzamena komisiono li estis akceptita kiel unuaranga kandidato por la filozofia agregacio. Dume li volis ankaŭ perfektigi sian kleriĝon en matematiko kaj en 1892 daŭrigis siajn studojn en la Fakultato de la sciencoj.⁵ En julio de ĉi tiu jaro Couturat estis akceptita por la matematika licencio kiel preferito de sia kurs-generacio. Nun li rajtis komenci la ŝatatajn studojn pri filozofio, kaj li dediĉis sin al la studado de la verkaĵoj de Lukrecio kaj Platono. Samtempe li trovis tempon por kunlabori kun la nova *Revue de métaphysique et de morale*.⁶ En majo 1894 Couturat, tiam 26-jara, estis nomita docento aŭ profesoro en la universitato de Tuluzo.

Post kiam en aprilo 1896 Couturat edziĝis al sia kuzino,⁷ kiu fariĝis fidela akompanantino de lia vivo, en junio li defendis siajn du disertaciojn en la Sorbono,⁸ kiuj ricevis honoran mencion. Dum lia latinlingve verkita tezo traktis la mitojn de Platono,⁹ lia franclingva disertacio elektis la temon de la matematika senfino.¹⁰ Per la ricevita stipendio li povis daŭrigi siajn sciencajn

studojn en Parizo, kie li dediĉis sin al la fiziko. La 27-an de oktobro li ricevis nomumon de la universitato de Caen, kie li pasigis du jarojn. Sekve, Couturat studis la filozofion de la matematika scienco, la rilatojn inter diversaj matematikaj sciencoj kaj la fundamenton de la ideoj pri nombro, ordo kaj grandeco, sed ankaŭ la diversajn sistemojn de la algoritma logiko kaj la rilatojn inter matematiko kaj logiko. Kelkaj specimenoj de liaj artikoloj estis publikigitaj en la supre menciita revuo pri metafiziko kaj moralo. Nova stipendio ebligis al li en oktobro 1899 reveni al Parizo por komenci novajn esplorojn, nun pri *Gottfried Wilhelm Leibniz*.¹¹

Serĉante la neeldonitajn verkaĵojn de la aŭtoro de la „Monadologio“¹² por pli bone kompreni liajn konceptojn pri logiko kaj metafiziko, en 1900-1 Couturat restadis en la reĝa biblioteko de Hanovro por poste publikigi du ampleksajn volumojn (*La logique de Leibniz* en 1901¹³ kaj *Opuscules et fragments inédits de Leibniz* en 1903).

Dank' al serio de artikoloj publikigitaj de Couturat en la *Revue de métaphysique et de morale* (1904), la franca scienca publiko konatiĝis ankaŭ kun la „Principoj de la matematiko“ de Bertrand Russel.¹⁴ Kaj Henri Bergson, profesoro pri filozofio en la Franca Kolegio,¹⁵ kiu fariĝis atenta pri Couturat, engaĝis lin en 1905-6 por trakti la historion de la logiko kaj fari lecionojn pri tiu ĉi fako, kiun nur malmultaj studentoj vizitis kaj kapablis aprezi kaj estimi. La materialo de tiu kursaro estis publikigita en la sama revuo en majo 1906.

Couturat kiel planlingvisto

Inter la grandaj ideoj, kiujn Leibniz disvastigis, troviĝis la ideo pri la logike konstruata universala lingvo. Ĉi tiun ideon rimarkis ankaŭ Louis Couturat, kiu en tiu okazo komencis kunlabori kun Léopold Leau, alia franca matematikisto kaj adepto de la ideo de la internacia planlingvo,¹⁶ eldonante en la jaro 1900 la broŝuron „Une langue universelle est-elle possible? Appel aux hommes de science et aux commerçants.“ (Ĉu lingvo universala estas ebla? Alvoko al la homoj de la scienco kaj al la komercistoj.). Por publike trakti la demandon de la enkonduko de tia logike konstruata universala helplingvo estis fondita, la 17-an de januaro 1901, de Leau kaj Couturat, la *Delegacio por alpreno de la lingvo internacia*.¹⁷ Ĉar la elekto de tia lingvo necesigis anticipan sciencan studadon de la diversaj ekzistantaj sistemoj kaj projektoj de la internacia artefarita lingvo, estis efektivigita la verkado kaj publikigo, fare de Leau kaj Couturat, de la ampleksa verko „Histoire de la Langue Universelle“, en 1903, kun kompletigo, en 1907, per la suplemento „Les nouvelles langues internationales“.

Komplete ravita de la ideo de la artefarite kaj logike kreita universala helplingvo, Couturat ekagis por efektiviĝi ĝin kadre de la „Delegacio“, kiu komence de oktobro 1907 jam kunigis reprezentantojn de 310 societoj de la tuta mondo. Krom tio, ĝi ricevis 1250 subskribojn de membroj de akademioj kaj universitatoj. Sekve, la delegacia komitato kunvenis en Parizo en sume 18 kunsidoj, en kiuj ĉeestis 12 sciencistoj el diversaj landoj, kiuj ŝajnis esti aparte kompetentaj por trakti la temon. Kiel konate, al la Delegacio apartenis eminentaj

lingvistoj kiel Wilhelm Ostwald el Germanio, Baudouin de Courtenay el Ruslando kaj Otto Jespersen el Danlando, krome konataj esperantistoj kiel Émile Boirac kaj Gaston Moch. Couturat kaj Leau, kiuj funkciis kiel ĝiaj sekretarioj, submetis al la komitato 210-paĝan raporton kun proponoj, memorandoj kaj diversspecaj kritikoj kaj deziroj, kiujn ili ricevis en la pasintaj ses jaroj. En sekva fazo de la delegacia laboro, la aŭtoroj de la diversaj planlingvaj projektoj estis invititaj por prezenti kaj defendi siajn proponojn kaj konceptojn, aŭ per persona ĉeesto, aŭ per delego de reprezentanto. D-ro L.L. Zamenhof, la aŭtoro de la lingvo Esperanto, decidis sendi s-ron Louis de Beaufront kiel komisiiton, kiu estis unu el la plej fervoraj Esperanto-propagandistoj de Francio,¹⁸ por reprezenti lin. Sed de Beaufront ne povis aŭ ne volis akcepti la inviton kaj anstataŭe liveris iun memorandon, kiu estis laŭtlegita dum la kunveno. Krom Esperanto en sia malnova formo, estis prezentita al la komitato la anonima projekto „Ido“ sub pseŭdonimo. Fine, la kunvenantoj venis al la konkludo, ke neniu el la ekzistantaj planlingvaj projektoj povas esti elektita aŭ adoptita sen modifoj. Sed oni tamen decidis en principo adopti Esperanton pro ties relativa perfekteco (sic). La delegacia historio finiĝis tiel, ke Zamenhof rifuzis trakti modifojn kun la „Lingva Komitato“, restante fidela al la „Fundamento“ kaj decidis ignori la „Delegacion“. Post sufiĉe malagrabra korespondado kun Couturat,¹⁹ Zamenhof fakte kvazaŭ malpermesis la 23-an de aŭgusto 1908 al la „Delegacio“ uzi la nomon Esperanto. Do, post la respondo de Zamenhof restis al la „Konstanta Komisiitaro“ de la „Delegacio“ nur la tasko realigi la modifojn en la senco de la projekto „Ido“ kaj uzi ĉi tiun lingvo-nomon. En 1908 la „Konstanta Komisiitaro“ de la „Delegacio“ fondis la monatan gazeton *Progreso*, kiu estis plene redaktita en la nova lingvo, kiun la esperantistoj sarkasme rifuzis kiel fuŝan reformon kaj malbelan dialekton de Esperanto. Couturat estis ĝia sekretario (kio signifas praktike ankaŭ ĝian redaktoron) kaj portis preskaŭ la tutan ŝarĝon kaj respondecon. Por krei kaj firmigi la propran lingvan fundamenton, Couturat partoprenis ankaŭ en la ellaborado kaj editorado de tri mezgrandaj vortaroj por idistoj anglaj, francaj kaj germanaj kaj du grandaj vortaroj por idistoj francaj kaj germanaj. Sekvis la eldonado de Ido-lernolibroj, verkita de diversaj aŭtoroj, kiuj transiris al tiu lingvoprojekto kaj kunlaboris kun Couturat (ekzemple C.S. Pearson, O. Jespersen, R. Lorenz, W. Ostwald, L. von Pfaundler, F. Schneeberger kaj aliaj). En 1909 fondiĝis la „Akademio Idista“. La zamenhofa Esperanto estis nomita de la idistoj „Esperanto primitiva“, en akompano de nelacigebla lukto kaj akra kaj laŭta polemiko kontraŭ tiu projekto.

Kiel de Beaufront skribis en sia Couturat-biografio, escepte de la du sekretarioj (do Couturat kaj Leau), neniu sciis, kiu estis la aŭtoro de Ido. Do, la demando pri la vera(j) aŭtoro(j) de la lingvo Ido longe restis ioma mistero, aŭ enigmo, kvankam oni supozis, ke aŭ Couturat, aŭ Leau, aŭ de Beaufront aŭ ĉiuj kune troviĝis malantaŭ tiu ĉi projekto. Unue, Louis de Beaufront deklaris, ke li mem estas la vera aŭtoro de la broŝuro kun la titolo „Ido“. Sed tio estis mensogo, aŭ

almenaŭ blufo. Dum la tridekaj jaroj la malkovro de ĉi-koncernaj leteroj, kiuj troviĝis en la arkivo de la „Delegacio“, postlasita de Couturat ĉe ties vidvino kaj esplorita de la svisa planlingvano Ric Berger, montriĝis, ke de Beaufront neniel estis la inventinto de Ido sed ke li estis nura pajlohomino uzita de Couturat kaj ke la vera aŭtoro de la lingvo Ido estis Louis Couturat mem.

Post la morto de Couturat en 1914 la lingvo Ido estis plupraktikata dum jardekoj ankaŭ de postaj generacioj de adeptoj. Sed la idistoj estis tre malmultaj²⁰ kaj agadis en la ombro de la pli potenca Esperanto-movado, kiu proklamis, plej malfrue en la 1950-aj jaroj, sian „finan venkon“ en la planlingva movado, konsiderante ĉiujn ceterajn planlingvojn fiaskintaj kaj ties adeptojn perfiduloj. Certe, la Ido-skismo signifis specon de traŭmato por la Esperanto-movado, kiu pluvivas kiel legendo en la memoro de la esperantistoj.

Mortiga akcidento en aŭgusto 1914

La vivofino de Louis Couturat okazis jene, kaj ege tragike, kiam dum la milita mobilizado en Parizo Couturat veturis, komence de aŭgusto 1914, en sia aŭtomobilo por viziti sia(j)n (ge)kuzo(j)n, kiu(j) devis militservi. Li estis survoje de Bois-le-Roi al Parizo, kaj akompanata de sia edzino. La 3an de aŭgusto li reveturis al Bois-le-Roi kun siaj edzino kaj kuzino, sur la strato de Ris-Orangis al Melun kaj kunpuŝiĝis kun grandformata kaj rapide veturanta aŭtovagono, kiu transportis mobilizitajn soldatojn. Dum la kuzino estis elĵetita el la aŭtomobilo kaj s-rino Couturat vundita, Louis Couturat mem ricevis tiel gravan baton aŭ rompon ĉe la brusto, ke li pereis post kelkaj momentoj.

Kritika pritakso

Kadre de ĉi tiu kurta omaĝa artikolo ne eblas entrepreni detalan kritikan pritakson pri la persono kaj verkaro de Louis Couturat. Unue, Couturat faris kaj produktis ankoraŭ multajn aliajn gravajn kaj interesajn aferojn ol Louis de Beaufront menciis en sia certe utila biografio. Inter alie, Couturat organizis la Unuan Filozofian Kongreson en Parizo en 1900 kaj korespondis ankaŭ kun Giuseppe Peano, la aŭtoro de la planlingvo „Latino sine flexione“, por diskonigi lian matematikan logikon inter francaj filozofoj.²¹ En *Revue de métaphysique et de morale* (1904) aperis ankaŭ lia signifa kontribuado pri „La filozofio de la matematiko(j) de Kantio“. Ŝajnas, ke liaj ne-planlingvemaj amikoj bedaŭris, ke tiel talentita sciencisto kiel Louis Couturat dediĉis tiom da *vana* tempo al sia nobla revo pri la universala lingvo.²²

Alian fojon ni povos okupiĝi pri la demandoj, kial Couturat kreis Idon, kio ne plaĉis al li ĉe Esperanto kaj kiel aspektis tiu lingvoreformo.

Andreas Künzli, 2014

La esencan bibliografion de la verkaro de kaj pri Louis Couturat vidu sub :

www.swissbib.ch (kie aperas ankaŭ titoloj ĉe CDELI)

<http://www.autodidactproject.org/other/ido-carlevaro.html>

Notoj

- ¹ Verkite surbaze de la originalo en Ido publikigita sub <http://www.literaturo.ido.li/louiscouturat.pdf>, kaj reproduktita sub http://io.wikipedia.org/wiki/Louis_Couturat.
- ² Komunumo situata 23 km sudoriente de Parizo en la departemento Essonne.
- ³ Pri kia lernejo temas vd. sub [http://fr.wikipedia.org/wiki/École_normale_supérieure_\(Paris\)](http://fr.wikipedia.org/wiki/École_normale_supérieure_(Paris)).
- ⁴ Laŭ PIV: En Francio, plej alta konkurso por dungo de liceaj aŭ universitataj instruistoj.
- ⁵ Pri kia fakultato temas vd. sub http://fr.wikipedia.org/wiki/Faculté_des_sciences_de_Paris.
- ⁶ Pri kia revuo temas vd. sub http://fr.wikipedia.org/wiki/Revue_de_métaphysique_et_de_morale.
- ⁷ De Beaufront uzis plurfoje la nocion 'kuzo/kuzino'. Ni ne scias pri kia tipo de kuzo aŭ kuzino temas, ĉar en la franca lingvo oni plurfacete distingas ĝin, vd. sub [http://fr.wikipedia.org/wiki/Cousin_\(famille\)](http://fr.wikipedia.org/wiki/Cousin_(famille)).
- ⁸ Pri kia institucio temas vd. sub <http://eo.wikipedia.org/wiki/Sorbono>.
- ⁹ Vd. sub <http://gallica.bnf.fr/ark:/12148/bpt6k678301>.
- ¹⁰ En kio konsistas ĉiuj tiuj teorioj vd. kurtan anglalingvan karakterizon sub http://www.encyclopedia.com/topic/Louis_Couturat.aspx.
- ¹¹ Epokfara germana filozofo kaj matematikisto, vivinta en 1646-1716. Bazajn indikojn pri liaj vivo kaj verko vd. sub http://eo.wikipedia.org/wiki/Gottfried_Wilhelm_Leibniz.
- ¹² Informojn kaj la tekston mem de tiu filozofia verkaĵo oni trovas en la interreto.
- ¹³ La teksto estas trovebla en la interreto sub <http://philosophyfaculty.ucsd.edu/faculty/rutherford/leibniz/intro.htm>, same de *The Algebra of Logic* (vd. <http://www.gutenberg.org/files/10836/10836-pdf.pdf>) kaj de *Traité de Logique algorithmique*.
- ¹⁴ Grava angla filozofo-epistemologo, logikisto kaj moralisto, vd. sub http://eo.wikipedia.org/wiki/Bertrand_Russell.
- ¹⁵ Pri Henri Bergson vd. sub http://eo.wikipedia.org/wiki/Henri_Bergson, kaj pri la Franca Kolegio vd. sub http://eo.wikipedia.org/wiki/Kolegio_de_Francio.
- ¹⁶ Vd. http://en.wikipedia.org/wiki/Léopold_Leau.
- ¹⁷ Vd. http://eo.wikipedia.org/wiki/Delegacio_por_alpreno_de_la_lingvo_internacia.
- ¹⁸ Vd. http://eo.wikipedia.org/wiki/Louis_de_Beaufront.
- ¹⁹ La Ido-skismon kaj la kverelon de Zamenhof kun Couturat mi traktis en mia Zamenhof-biografio (Harrassowitz 2010), kun la citado de la koncernaj leteroj, kiujn oni povas legi en la ORIG/PVZ de ludovikito.
- ²⁰ La retpaĝojn de la Ido-organizaĵoj vd. sub <http://www.uli-ido.info> kaj <http://www.idolinguo.de>.
- ²¹ Vd. <http://www.jstor.org/discover/10.2307/40694494?uid=3737760da&uid=2&uid=4&sid=21104536456177>.
- ²² Vd. sub <http://www.britannica.com/EBchecked/topic/140988/Louis-Couturat> kaj http://www.encyclopedia.com/topic/Louis_Couturat.aspx.

-oOo-

Indekso enhava de *SES informas* Jaro 2014 nur kajeroj 1, 2, 3.

Favore al retrovo de artikoloj kaj de informoj aperintaj en nia organo.

La redaktoro : Claude Gacond.

Mallongigoj :

e-o = esperanto

e-a = esperanta

e-ista = esperantista

e-isto = esperantisto

i-a = internacia

n = numero

p = paĝo

ps = pseŭdonimo de

Titolo de libro, verko aŭ periodaĵo

A

Adler Alfred : n2p34.

Aebi Traugot Rinaldo : n1p11.

Afrika Komisiono : n1p11, n3p25.

Afrika Kongreso de E-o : n1p2, 8, 11, 20, 39, n3p24-25.

Akademio de E-o : n3p27.

Allemand Luc : n1p7, 9, 15, n2p15-16, 22, n3p14, 21-22.

AMO-agado : n3p11.

Arnaud Monique : n3p2, 21.

Asocio Amikoj de CDELI : n1p7, 13, 23.

Asocio E-o-Genève-Régions : n1p3, n2p2, n3p3.

Asocio pri socikulturaj interŝanĝoj : n1p9.

Aŭtor-rajtoj : n1p26.

Aventuroj de pioniro (Privat) : n1p13.

B

Bachmann Louise : n1p11.

Basel = Bazelo : n1p18-19, 26.

Barcelono : n1p20.

Baumgartner Carlo kaj Dorotea : n3p6, 25.

Baudouin Charles : n2p34.

Baur Arthur : n1p7, 24-29, n3p7, 8, 11.

Baur-Sallenbach Heidi : n1p24-29.

Bélisle Marion : n1p7, 18, 21, n2p21.

Bélisle Romain : n1p21.

Bélisle Samuel : n1p21.

Belov Stanislav : n1p33.

Beneš : n1p28.

Benino : n1p20, n3p24.

Benvenuti Maria : n1p11.

Berno : n1p9-10, 28-29.

Bielo : n1p7.

Biografia leksikoneto de la japana esperanto-movado : n1p16.

Biografia leksikono de la esperanto-movado en Japanio : n1p16.

Biollay Jean : n1p15.

Blanc Maillard Charlotte : n1p19, n2p21, n3p21, 29-36.

Bordeaux : n1p20.

Bovet Pierre : n2p31-33.

Bratislava : n1p28.

Bringolf Alain : n1p8.

Britio : n1p20.

Brno : n1p28.

Broc : n1p9, 20.

Brouwer Anke : n1p15, 18, n2p20.

Bruselo : n1p29.

Buchard Marguerite : n1p15, n3p23.

Buhlmann David : n1p11.

Bulgario : n3p27.

Der Bund : n1p9.

Bonaero : n1p32.

Bureau international d'éducation : n2p33.

Butts : n2p34.

C

Caen : n1p20.

Carlevaro Tazio : n1p11, 26.

Carlevaro Teresita : n1p11, 26.

Carrier Danielle : n1p7, 15.

Carol Luiza : n2p16.

CDELI = Centre de documentation et d'étude sur la langue internationale : n1p3, 7-8, 13-16, 18, 23-26, n2p2, 7, 15-16, 18, 21, 32, 3p2, 3, 8, 14-15, 19.

Céréssole Pierre : n1p13, n2p34.

Charters Duncan : n2p18.

Chaves Gabriel : n3p25.

Chaves-Walder Verena : n2p22, n3p25-26.

Cherpillod André : n1p14, n2p16, 21, n3p8, 15, 20.

Chevalley Marcel : n1p15, n3p6.

CIFOM (teknika lernejo) : n1p9.

Claparède Edouard : n2p33.

Clermont-Ferrand : n1p26.

Corsetti Renato : n1p32.

Cseh-metodo : n1p29.

Cully : n1p10.

Ĉ

Ĉekoslovakujo : n1p28.

Ĉina E-o-Ligo : n2p27.
Ĉinio : n1p16, n2p25-30, n3p29-36.
Ĉokolado (Suchard) : n1p26.
Ĉu li bremsis sufiĉe ? (Piron) : n1p26.

D

Danneil Hans : n2p31.
Danneil Henriette = Ith-Wille Henriette :
n2p31-35.
Dasgupta Probal : n1p32.
Daubercies Sonia : n2p3, n3p4, 7, 23, 29-36.
Delémont : n1p8.
De Mestral Dominique : n3p25-26.
De Mestral Elisabeth : n1p19, n3p25-26.
Descoedres Alice : n2p33.
Didaktika afiŝaro (Gacond): n2p7-15, n3p17.
Dognac Henri : n2p9-14.
Dovat Lucienne : n1p6-7, 40.
Dubuis Vincent : n1p40.
Ducloyer Josette : n3p10.
Ducret Aïdonidis Laurence : n1p11.
DVD-filmo *Esperanto* : n1p30.

E

Eggenberger Gertrud : n2p6, n3p6.
Eisenegger Elisabeth : n2p22.
Erni Hans : n1p26.
E-o (revuo) : n1p31, n2p19, 33, n3p12, 27.
E-o-Amikejo (Ĉinio): n2p29.
E-o-balono : n1p26.
E-o-Grupo La Stelo (Genève) : n1p3, n2p2,
20, 33, n3p3, 19.
E-o japana vortaro : n1p16.
E-o kaj Interlingvistiko en Svislando
(ekspozicio) : n1p26.
E-o-Klubo (Wil) : n1p3, n2p2, 22, n3p3, 23.
E-o-Muzeo en Zaozhuang : n2p28, 36.
E-o-net (ret-kurso) : n2p16.
E-o-poŝtmarko : n1p26.
E-o-Societo Basel : n1p3, 19, n2p2, 20, n3p3,
19.
E-o-Societo Züriko : n2p22, n3p23-24.
Esploroj pri vortofteco en e-o kaj aliaj lingvoj
(Bovet/Ith) : n2p32.
Esprimoj de sentoj en Eo (Privat) : n1p13.
L'Essor : n2p35.
L'Essor de l'E-o : n1p8.
Etoy : n1p19.
Eucken Rudolf Christoph : n2p32.

F

Favre Alain : n2p24.
Federalismo : n1p26, 28.
Fejficova Magdalena : n2p18.

Feno (vento) : n1p25.
La fenomeno Svislando (Baur) : n1p26.
Ferrière Adolphe : n2p31-35.
Fettes Mark : n1p32, n2p18, n3p12, 27.
Foiro de inventistoj en Genevo : n1p9.
Fontannaz Nancy : n1p3, 4, 7, 9, 15, n2p2, 3,
15, n3p3, 4, 25.
Franca E-o-Instituto : n2p24.
Francio : n1p20, n2p20.
Frank Helmar : n3p27.
Freinet Célestin : n1p18, n2p20, n3p13.
Frauchiger Benno : n1p9, n3p8.
Freud Sigmund : n2p34.
Friot Jean-Noël : n2p15.

G

Gacond Andrée : n1p7, 11, 15, 24-26, n2p1,
n3p2, 6.
Gacond Claude : n1p4-7, 9, 14-15, 17-18, 24-
29, n2p3, 5, 7-9, 21, 32, n3p2, p4, 6, 8-9, 12,
14, 34.
Gandhi (Mahatma) : n1p13, n2p34.
Garcia Stéphane : n2p31-35.
Gaxer Walter : n1p11.
Gazareth Pascale : n1p8.
Genève = Ĝenevo : n1p8-9, 19, n2p33.
Germanio : n1p21.
Glättli Ernst : n2p6, n3p6.
Gotoo Itasi : n1p16-17.
Graf Bruno : n1p31-32, n3p8, 10-12.
La Granda Ursino = La Grande Ourse
(lernejo) : n1p17-18, n2p20, n3p19-20.
Grazhdanova Oxana : n3p4.
Grenoblo : n1p17, n2p20.
Grésillon kursoj : n1p22, n2p23, n3p26.
Grosjean Joëlle = Jolane : n1p7, 21.
Grosjean Mireille : n1p2, 4, 6-7-11, 15, 17-
18, 21, 39-40, n2p3, 5, 15-16, 19-20, 22, 24-
25, n3p1, 2, 4, 6, 7, 12, 14, 21, 23, 25, 27, 29.
Grossmann Hans-Werner : n1p4, 8, 11-12,
n2p5, n3p7.
Grundtvig-projekto : n1p10.

Ĝ

Ĝenerala Kunveno de SES : n3p12.

H

Haenni Ueli : n3p8-9, 25.
Harlem : n1p29.
Harris William : n2p18.
Hasler John : n1p11.
Heroldo de E-o : n2p30.
Heroldo komunikas : n1p31.
Herzberg am Harz : n1p21.

Hispanio: n1p20, n2p17, n3p27.
Hodler Hector : n1p13.
Hommes sans visage (Rémy) : n2p31-35.
Houlmann Emmanuelle : n1p11.
Humbert-Fink Yvette : n1p11.

I

Infanoj : n1p26.
Institut Rousseau : n2p32-33.
Instruado : n1p26.
Instrui Dokumenti Organiz : n2p29.
Interlingvistikaj studoj de Universitato Adam Mickiewicz en Poznan : n2p8.
Interna Ideo : n1p31.
I-a Civilservo : n2p34.
ILEI = I-a Ligo de E-istaj Instruistoj : n1p6, 8, 17, 21-22, n2p16-19, 24, n3p26-29.
IPR = *I-a Pedagogia Revuo* : n2p16.-17, n3p21.
Intervjuoj (Svisa Radio Internacia) : n1p26.
Ipernity : n1p33.
Irano : n2p17, n3p27.
Isino Yosio : n1p15.
Islando : n1p21.
Ith Emile : n2p34.
Ith-Wille Henriette : n2p31-35.

J

Japana E-a Librokooperativo = JELK) : n1p16.
Japana E-o-Instituto : n1p16.
Japanio : n1p15-17.
JES = Junularo E-ista Svislanda : n1p6, n3p9.
JA = *Juna Amiko* (revuo) : n1p22, n2p16, n3p27.
Jouvet Laurent : n3p26.
Jung Carl Gustav : n2p34.

K

Kanado : n1p25.
Kansaja Ligo de Esperanto-Grupoj : n1p16.
Kanto-semajno (Ardeŝo) : n3p25-26.
Katarismo : n3p16.
Keller Stefano : n1p4, 7, 9, 15, 23, n2p3, 9, n3p2, p4, 6, 15.
KER-ekzamenoj : n3p19.
Kimura : n1p10.
Kiselmann Christer : n3p27.
Koganei Mariko : n1p15.
Kojinek : n1p28.
Kolker Boris : n1p33.
Koller Alois : n1p11.
Kolokvo pri Pacedukado : n1p9.
Komitatano Z : n1p31.

Kongo RDC . n2p17, n3p27.
Korobejnikov Andrej : n1p10.
Korody Zsofia : n2p18.
Korĵenkov Aleksander : n1p31.
Kotonuo : n1p2, 11, 20, n3p24.
Koutny Ilona : n2p8, 19, 24-25.
Kovats Katalin : n2p18.
Kubo : n1p20.
Künzli Andreas : n2p28.
KCE = Kultura Centro E-ista : n1p7-8, n2p5.
Kvinpetalo en Bouresse : n2p23, n3p26.

L

La Chaux-de-Fonds : n1p7-8, 17-18, n2p18, 20, 31, n3p15, 19.
Langnau : n1p7.
Lapenna Ivo : n1p26.
La Sagne : n2p31, n3p15.
Lausanne : n1p10, 19.
Laŭzana E-o-Societo : n1p3, n2p2, 16, 21, n3p3, 20.
Lavanchy Eliane : n1p11.
Lavanchy Jean-Jacques : n1p11.
Le Havre : n1p20.
Le Locle : n1p8-9, 21.
Lernu.net (ret-kurso) : n2p16.
Les Brenets : n1p10, 21, n3p2, 21.
Li Weilun : n2p30.
Libera Folio : n1p31.
Liechti Fritz : n1p26.
Ligo de Nacioj : n2p33.
Lingva kafejo : n3p21.
Lingwe Uniwersala (Zamenhof) : n1p26.
Linsted Jouko : n1p26.
Liu Jun : n2p25, 36, n3p25.
Lyon = Liono : n1p17, 20, n2p20.

M

MacGill Stefan : n1p22, n2p18, n3p12, 27, 29.
Mainz : n1p29.
Maire-Hefti Monika : n1p8.
Maison d'Ailleurs (muzeo) : n1p4, n3p10.
Malanda Emile : n3p24-25.
Marchon Gabriel : n1p15.
Marček Stano : n1p22, n2p16.
Margot Nicole : n1p7, 15, n2p15, n3p25.
Marks Karl : n2p28.
Martinelli Perla : n1p26.
Mazdaismo : n3p15.
Meigniez Sarah kaj Sylvain : n2p21.
Métabief : n1p7, 20.
Mine Yositaka : n1p16.

Miyamoto Masao : n1p16, 26.
Moerbeek Rob : n1p16, n3p27.
Molnár Mónika : n1p7, 15, 18, n2p15, 20, 25.
Monastier : n2p34.
Monato (magazino) : n1p26.
Mondo de travivaĵoj (Sekelj) : n1p33.
Montesori Maria : n2p33.
Montevideo : n1p26, n2p17, 24, n3p26-27.
Montesinos de Gomis Ana : n2p17.
Moon Brian : n2p23.
Moret Sébastien : n2p15, 25, n3p20.
Morocz Istvan : n2p22, n3p6.
Müller André : n2p22.
Münger Marie-Louise : n1p4, n2p3, n3p7.
Mulhouse : n1p19.

N

Nacia Biblioteko en Berno : n1p26.
Natio : n1p26, n2p24.
Naturamikoj : n1p26.
Naturprotektado : n1p26.
Nederlando : n1p26, 28.
Nelson Leonard : n2p32-33.
Nemeth Jozefo : n2p16, 18.
Nepalo : n1p21, n2p16, n3p29.
Neuchâtel : n1p8, n2p18, 21, n3p21-22.
Ni transformu la lernejon (Ferrière) : n2p34.
Nicolet Bernard kaj Claire-Marie : n3p25.

O

Oberbauch Madella Luigia : n2p16.
Obrecht Milou Helga : n2p22.
La Ondo de Esperanto : n1p31.
Oostende : n2p17.
Ortelli Luciano : n1p11.

P

La papilio (Carol) : n1p33.
Parizo : n1p17, 20-21, n2p19-20.
Pasporta Servo : n1p6, 9.
Pekino : n2p25.
Perera Ramon : n1p4, n3p10.
Per-retaj kursoj : n1p23-24.
Peter Rüetschi (d-rino) : n1p29.
Péterman Françoise : n3p21.
Petrovic Radojica : n2p17.
Piron Claude : n1p26, 31.
Planlingvo : n1p26.
Pochanke Barbara : n2p5, n3p8.
Poezia bukedo (Potts) : n1p26.
Pollando : n1p20.
Potts Bertram : n1p26.
Pour l'Ere Nouvelle (revuo) : n2p34.
Prago : n1p8.

Prakash Khadka : n1p21.
Poznan : n1p20-21, n2p8, 19, 24.
Privat Edmond : n1p13, 26, 28, n2p33-34.

R

Radio-aŭskultantoj : n1p25.
Radio-elsendoj : n1p28.
Radioprelegoj : n1p23-29.
Randin François : n1p10, n2p15-16.
Rheinfelden : n1p25.
Rejkjaviko : n1p6, 10, 17, 32, 40, n2p20.
Rejno : n1p26.
Rémi Henriette ps Ith Henriette : n2p31-35.
La Revuo Orienta : n1p15.
Rezolucio 47a ILEI-Konferenco : n3p27-28.
Rezolucio pri E-o de UNESCO : n1p26, n2p17, 24, n3p27.
Rikmetodo : n1p40.
Risso Sonia : n2p17.
Rivière Jimmy : n1p11.
Robin Cléa : n1p11.
Robin Jean-Marie : n1p11.
Rohrbach Marc : n1p40.
Rolland Romain : n1p13.
Rooke Dieter : n1p8, n2p3, 5-6, 22, 25-30, 36, n3p4, 7, 8, 25-26.
Roterdamo : n1p31.
La Rozavère (hejmo) : n1p7,40.

S

Saint-Imier : n1p8.
Saka Tadisi : n1p16.
Sandoz André : n1p9, 15.
Sarkasmoj (Miyamoto Masao) : n1p26.
Savagnier : n1p9.
Schick Carl : n2p22.
Schneller Martine : n1p7.
Schneller Richard : n1p4, 7, 9-10, 23, n2p3, 31-32, n3p4.
Scio Sen Bariloj (fonduso) : n1p11.
Senarmigo kaj edukado (Ferrière) : n2p34.
Sendai : n1p17.
Senegalo : n1p20.
SAT = Sennacieca Asocio Tutmonda : n1p6, 10.
SAT Amikara Kongreso : n1p7, 20.
SAT-Amikaro : n1p6, 10, 20.
SEL = Service Echanges Libres : n1p9.
Shany Mian Salam : n3p29.
Shibata Iwao : n1p16-17.
Silfer Giorgio : n1p26.
Der Sinn und Wert des Lebens (Eucken) : n2p32.

Sixtus Christiane : n1p15.
Societo de Amikoj (kvakeroj) : n2p34.
Staad : n1p6.
Staĝo de E-o-France Est : n1p21.
Studsabatoj en CDELI : n1p14-15, 24, n2p2, 7, n3p3, 19.
Suchard Philippe : n1p26.
Sun Mingxiao : n2p28.
Svisa enciklopedio planlingva (Künzli) : n2p5, 28, n3p11.
Svisa E-o-Junular-Kanto-konkurso : n2p6, 22, n3p8.
Svisa E-o-Koruso : n1p6-7, 19, 40, n3p10.
SES = Svisa E-o-Societo : n1p5-12, 31, 40, n2p4-6, n3p5-10.
SES informas : n1p9-10, 14, 18, 33, n3p14.
SFERO = Svisa Feria E-a Renkontiĝo : n1p5, 7, n2p6, n3p8, 17-18.
SIS = Svisa ILEI-Sekcio : n1p6-7, 17-18, n2p15-16, 20.
SRI = Svisa Radio I-a : n1p7, p23-29.
Svislando : n1p11, 18, 20, 25-26, 28.

Ŝ

Ŝanhaja E-o-Asocio : n2p25.

T

Taizé : n1p20.
Tamen perdota (Privat) : n1p13.
Tanaka Sadami : n1p16.
Tanner Adrian : n1p11.
Tchikpe Privas : n1p2.
Terre des Hommes : n1p25.
Tokyo : n1p10.
Tonkin Humphrey : n1p26, 32, n2p18, 25.
Tout Doux Tout Doubs (Grosjean) : n1p20-21.
Tra l' silento (Privat) : n1p13.
Transformons l'école (Ferrière) : n2p34.
Tria Mondo : n1p25.
Triolle Renée : n3p2, 21.
TAGE = Tutmonda Asocio de Geinstruistoj E-istaj : n2p33.
TEJO = Tutmonda E-ista Junulara Organizo : n2p18.
Tutmonda Konferenco (Kolokvo) pri Instruado de E-o : n1p5, 8, n2p18, n3p1, 8, 12-14.
Tutmonda Kongreso de Edukado : n2p33.

U

UEA = Universala E-o-Asocio : n1p7, 10, 26, 31, 40, n2p17-19, 25, n3p11-12, 27.

UK = Universala Kongreso : n1p6, 9-10, 17, 25, 28-29, 40, n2p17, 20, 24-25.

UN : n1p9.

UNESCO : n1p21, 25-26, n2p17, 19, 24, n3p27-28.

Usono : n1p26.

Uster : n1p11.

V

Valano = ps Piron Claude : n1p26.

Valezo : n3p23.

Valle Fabricio : n1p31, n3p12, 27.

Van Puijenbroek Ruth : n1p11, n3p6.

Varsovio : n2p18.

Vasserot Jaqueline : n3p25.

Vatré Henri : n2p32.

Verne Jules : n2p4, n3p6, p10.

Vicques : n2p21, n3p20.

Wikipedio : n2p24.

Vivo de Zamenhof (Privat) : n1p13.

Von Büren Jean-Thierry : n2p15-16, n3p5.

Von Salis (prof.) : n1p28.

Vordemwald : n2p6, n3p17.

W

Wang Minhao : n2p25.

Waringhien Gaston : n1p26, n3p15.

Weidmann Dietrich : n1p4, 6, 8, 10-11, n2p3, 5, 15, 22, n3p4, 7, 8, 14.

Weidmann Nelida : n1p4, 11, n2p3, 22, n3p4, 6-7.

Wille: n2p31.

Wille Charles : n2p31.

Wille-Borkiewicz Jenny : n2p31.

Winterthur : n1p25, 27.

X

Xiao-feng Gong : n2p18-19.

Y

Yverdon-les-Bains : n1p5, n2p4.

Z

Zagreb : n1p28.

Zhang Changshen : n2p27.

Zamenhof L.-L.: n1p16, 26, n2p27-28.

Zebrowski Lukasz : n2p18.

Zelazny Walter : n1p26.

Zaslowski Véra : n2p15.

Zoller Raymond : n1p9.

Zürich : n1p25, 27, 29.

-oOo-



Dum la solena inaŭguro de la 81-a Itala Kongreso de Esperanto
en Fai della Paganella.
Fotoj de Wolfgang Carrier.





La gajnintoj de la unua SEJK kanto-konkurso :
Sydney Bracher, Bastien Voëlin, Kira Maire, Malou Graf kaj Antoine
Senn, ĉiuj estas gelernantoj de *La Granda Ursino* en La Chaux-de-Fonds.



La ekskursantoj de SFERO en Zofingo.